

terminproponoj: **1) vojo devia** = ĝisnuna termino
2) branĉvojo

01036 Rekta vojo en rekta trakforko, aŭ pli grandradiusa vojo en kurba trakforko.

ĉeĥa	<i>přímá větev (výhybky)</i>	pola	<i>tok szynowy toru</i>
dana	<i>stamspor (sporskifte)</i>		<i>zasadniczego (rozjazd)</i>
franca	<i>branche directe (branchement)</i>	rumana	<i>linie directă</i>
germana	<i>Stammgleis (einer Weiche)</i>	serba	<i>osnovni skretnički</i>
hungara	<i>egyenes irány kitérőben</i>		<i>kolosek</i>
itala	<i>ramo diretto (deviatoio)</i>		

terminproponoj: **1) vojo rekta** = ĝisnuna termino
2) trunkvojo

PIV klarigas: **rekta 3** Senpera, funkcia sen interveno de perilo.

En la sekva difino menciitaj liniokategorioj koncernas maksimume permesatajn radaksrilatajn (A, B, C) kaj pometrajn (1, 2) masojn:

12967 Surskribaĵ-tabelo ĉe varvagonoj, indikanta pri la maksimume permesata ŝarĝmaso en tunoj laŭ la kategorio de surveturataj fervojlinioj (klasifiko en RIV) kaj laŭ la maksimuma rapido (S = 100 km/h).

germana *Lastgrenzraster*
terminproponoj:

1) ŝarĝlimtabelo (varvagono)
2) skemo pri ŝarĝlimoj (varvagono)

PIV klarigas:
tabelo 4 Presita metoda listo de nomoj, nombroj aŭ vortoj, aranĝita tiamaniere, ke la bezonanto povas facile trovi ĉiun el ili.
skemo Teoria simpligita figuraĵo, prezentanta maldetale ne la formon, sed la aranĝon kaj la rilatojn de io.

	A	B 1	B 2	C
90	41,8 †	48,0 †	49,8 †	57,5 †
S	41,8 †	48,0 †	49,5 †	

La lasta nocio temas pri signalado per signalilo aŭ signalplato:

12999 Signalo prezentata ĉe loko ekde kiu la signalordono estas plenumenda, eventuale sekve de antaŭa anoncosignalo.

angla *execution signal*
franca *signal d'exécution*
germana *Ausführungssignal*

terminproponoj: **1) signalo loke plenumenda**
2) bildsignalo loke plenumenda

Karaj geomikoj, mi deziras al la kongresaj partoprenontoj agrablan vojaĝon al *Poznań*. Kunlaborantojn kiuj ne povos partopreni, mi afable petas antaŭe skribi aŭ rete sendi opiniojn.

Via *Heinz Hoffmann*

Terminara Kuriero

TeKu 133

Aprilo 2008

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør
Telefona: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:


D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul
Telefona: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

Karaj gekolegoj,

jen novaĵo: Per *RailLexic*-aktualigo, Internacia Fervojunio *UIC* enigis 311 novajn nociojn – pleje difinitajn – en sian fervojterminologian datumbankon. Ili havas ŝlosilnumerojn 12690 – 13000. Ĝis nun ili aperis nur en la 3 versioj angla, franca kaj germana. Por la aliaj lingvoj - do ankaŭ por Esperanto – estas tasko traduki. Ankaŭ la nombro de datumbankaj lingvoj pligrandiĝis: Ekster la ĝis nun 19, *UIC* nove enkondukas 4 lingvojn, nome araba, kroata, norvega kaj turka.

Rezulte el ĝisnuna traktado mi konstatis, ke plej granda parto de la novaj nocioj estas derivaĵoj kaj specialaĵoj tiaj, ke iliaj Esperanto-terminoj estas krebblaj kiel kunmetoj el jam deciditaj terminoj. Do, mia aktuale ĉefa laboro estas serĉado de superordaj, kunordaj kaj subordaj nocioj kun ties terminoj en 3-a eldono de *RailLexic*. Nur ĉe tre malgranda parto de novaj nocioj necesas pridiskuti plej taŭgajn terminojn en nia sekcia rondo. En ĉi tiu TeKu vi trovas ankaŭ taskojn pri ses de la novaj nocioj.

Mi ne prisilentu malbonan informon: En la ĝisnuna datumbanko estas trovita grava kaj komplika perturbo en la programaro. Ĝi ankaŭ kaŭzis detruon de malgranda parto el de mi enigitaj difintekstoj. *UIC* nun streĉe klopodas venki la programaran problemon. Ĝis tiu solvo mia enigo devas ripozi.



Trajno proksime de *Wolsztyn*, celo de nia ekskurso D2

Preparo por 60-a IFEF-kongreso

1. Alvenintaj kontribuoj

Pri la taskoj en TeKu 131 kaj 132 alvenis kontribuoj de la dana grupo (*Erik Mortensen, Jan Niemann, Henning Olsen*), de *Tibor Kristály (HU)* kaj de *Zdeněk Polák (CZ)*. *Tibor Kristály* en sia bildvortaro elektis por nocio 05003 la terminon „trudmanipulo”. Koncerne nociojn 08139 kaj 08982 li konsentas pri la proponoj „signalrimedo” kaj „trafiko grandrapida”. La sekva tabelo montras la elektojn de la dana grupo kaj de *Zdeněk Polák*:



TeKu 131	dana grupo	Zdeněk Polák
05003	x substitua funkciigo	substitua funkciigo
05004	prokrasta funkciigo	
08244	sekurigaj aferoj	signal-sekuriga sistemo
08982	trafiko grandrapida	
TeKu 132		
00795	serio da trajnoj	trajnserio
04183	x stacio landlima trajntransprena	stacio interŝanĝa (personalo / lokomotivo)
06632	signalilpozicio nevetura	signalilpozicio plej restriкта
06641	signalilpozicio veturpermesa	signalilpozicio veturpermesa
07015	pasaĝerkajo intertraka unubordera	
08094	deĵoro cirkuliga	deĵoro vetur(ig)a
08139	signalrimedo	signalrimedo
08196	signalajo trakuzeblolima	limsigno (trakokonverĝo)
08212	signalilo libere veturpozicia	

Sekve estu deciditaj la terminoj por 05004, 08982, 06641, 07015, 08139 kaj 08212.

2. Restantaj taskoj el TeKu 131 / 132

Sekve de tiuj kontribuoj rezultas jenaj terminŝanĝaj proponoj por pripensi kaj elekti:

05003 el TeKu 131, paĝoj 2/3:

- 1) substitua funkciigo
- 2) trudmanipulo

08244 el TeKu 131, paĝo 4:

- 1) signal-sekuriga sistemo
- 2) sekurigaj aferoj

06632 el TeKu 132, paĝo 4:

- 1) signalilpozicio plej restriкта (laŭ nuna 08214: „signalilpozicio restriкта”)
- 2) signalilpozicio nevetura

08196 el TeKu 132, paĝo 5:

- 1) limsigno (trakokonverĝo)
- 2) signalajo trakuzeblolima

00795 el TeKu 132, paĝo 5/6:

- 1) serio da trajnoj = ĝisnuna termino
- 2) trajnserio

TRAJNSERIO = TRAJNSERIO
SINSEKVO DE EGALVEVETURASERIOJ

Por nocio 03963 Terminara Komisiono iam decidis la terminon „bremsado laŭŝarĝe adaptiĝanta”. Nun *UIC* enigis noción pri la koncerna ilo:

12902 Regulilo por aŭtomata adaptado de bremsadforto proporcie al la aktuala veturilpezo inklude de ŝarĝo.

angla *automatic load compensation*
franca *correction automatique de charge*
germana *automatischer Lastausgleich*

- terminproponoj: **1) bremsadadaptilo laŭŝarĝa**
2) bremsadregulilo ŝarĝ-adapta

Jam en TeKu 115 sur paĝoj 2 kaj 4, en TeKu 116 sur paĝo 3 kaj en TeKu 117 sur paĝo 4 (espereble konservitaj de vi) estas traktataj la du specoj de kurbaj trakforkoj, tiam ne listigitaj en *RailLexic*. Termindecidoj ne sukcesis. Nun *UIC* enigis la nociojn:

12924 Kurba trakforko, ĉe kiu la (devia vojo?) situas ekstere de la (rektvoja?) kurbiĝo.

angla *outside curved turnout*
franca *appareil de voie enroulé extérieur*
germana *Außenbogenweiche*

- terminproponoj: **1) trakforko eksterenkurba**
2) trakforko elkurba

12925 Kurba trakforko, ĉe kiu la (devia vojo?) situas interne de la (rektvoja?) kurbiĝo.

angla *inside curved turnout*
franca *appareil de voie enroulé intérieur*
germana *Innenbogenweiche*

- terminproponoj: **1) trakforko internenkurba**
2) trakforko kunkurba


La demandsignoj en la supraj du difinoj montru la ĝis nun ne solvitan taskon pri la du vojoj en trakforko laŭ TeKu 115 (paĝoj 3/4), TeKu 116 (paĝoj 2/3) kaj TeKu 117 (paĝoj 3/4):



Kurbaj trakforkoj

01035 Kurba vojo en trakforko, ĉe kiu la vojo kun malpli granda radiuso.

ĉeĥa *odbočná větev (výhybky)*
dana *afvigende gren (sporskifte)*
franca *branche déviée (branchement)*
germana *Zweiggleis (einer Weiche)*
hungara *kitérő irány*
itala *ramo deviato (deviatoio)*
pola *tok szynowy toru zwrotnego (rozjazd)*
rumana *linie abătută (la schimbător de cale)*
serba *odvojni skretnički kolosek*



04183 el TeKu 132, paĝo 6:

- 1) stacio interŝanĝa (personalo / lokomotivo) = ĝisnuna termino
- 2) stacio landlima trajntransprena

08094 el TeKu 132, paĝo 6:

- 1) deĵoro vetura
- 2) deĵoro veturiga
- 3) deĵoro cirkuliga

3. Novaj taskoj de *RailLexic 3.0*

La komencaj du nocioj koncernas ĝeneralan elektroteknikon:

01978 Relajskontaktilo kiu estas en fermita stato, dum la relajsbobeno estas senkurenta.

ĉeĥa	<i>klidový dotek (relé)</i>	itala	<i>contatto basso (relè)</i>
dana	<i>hvilekontakt; brydekontakt</i>	pola	<i>zestyk rozwierny</i>
franca	<i>contact bas</i>	rumana	<i>contact de repaus</i>
germana	<i>Ruhekontakt (Relais)</i>		<i>(a unui releu)</i>
hungara	<i>bontó érintkezõ</i>	serba	<i>mirni kontakt (relej)</i>

La ĝisnuna Esperanto-termino „kontaktilo (relajso)” estas tro ĝenerala. Jen du terminŝanĝaj proponoj:

- 1) kontaktilo ripoza (relajso)
- 2) kontaktilo ripozferma (relajso)

01983 Relajskontaktilo kiu estas en fermita stato, dum kurento trafluas la relajsbobenon.

ĉeĥa	<i>pracovní dotek (relé)</i>	itala	<i>contatto di funzionamento (relè)</i>
dana	<i>arbejdskontakt</i>	pola	<i>zestyk roboczy</i>
franca	<i>contact de fermeture</i>	rumana	<i>contact de închidere (releu)</i>
germana	<i>Arbeitskontakt (Relais)</i>	serba	<i>radni kontakt (relej)</i>
hungara	<i>záróérintkezõ</i>		

- terminproponoj:
- 1) kontaktilo labora (relajso) = ĝisnuna termino
 - 2) kontaktilo kurentferma (relajso)

Sekvas du nocioj, kiuj temas pri kroma lokomotivo ĉe trajnfino. Do ne koncernas lokomotivon kiu sole (sen trenanta trakciilo) puŝadas vagonaron:

05226 Lokomotivo ĉe fino de trajno kun trenanta trakciilo, por aldona puŝado.

ĉeĥa	<i>postrková lokomotiva</i>	itala	<i>locomotiva di spinta</i>
dana	<i>skydelokomotiv</i>	pola	<i>lokomotywa dodatkowa</i>
franca	<i>locomotive de pousse</i>	rumana	<i>locomotivă împingătoare</i>
germana	<i>Schiebelokomotive</i>	serba	<i>potiskivalica</i>
hungara	<i>segélymozdony</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino „puŝlokomotivo” inkludas ankaŭ sole (sen trenanta trakciilo) puŝadantan lokomotivon. Pro tio du terminŝanĝaj proponoj:

- 1) lokomotivo krompuŝada
- 2) lokomotivo helppuŝada

Pri puŝ(ad)o PIV klarigas:


- | | |
|---------------|-------------------------------|
| puŝo 1 | Forta ekpremo, kiu delokigas. |
| puŝado | Daŭraj aŭ ripetaj puŝoj. |

05229 Lokomotivo vicigita ĉe trajfino, kiu – kontraste kun (krompuŝada lokomotivo?) – donas povumon nur por propra movo, kaj ĉiukaze restas ĉe la trajno ĝis iu stacio.

ĉeĥa	<i>koncová lokomotiva</i>	hungara	<i>záró mozdony</i>
dana	<i>slutlokomotiv</i> (<i>oversættelsesforslag</i>)	itala	<i>locomotiva di coda</i>
franca	<i>locomotive de queue</i>	pola	<i>lokomotywa końcowa</i>
germana	<i>Schlusslokomotive</i>	rumana	<i>locomotivă final de tren</i>
		serba	<i>lokomotiva na kraju voza</i>

La ĝisnuna Esperanto-termino „lokomotivo trajnfina” inkludas ankaŭ puŝad-
antan lokomotivon. Mi trovis nur unu pli klaran terminon:

lokomotivo trajnfina nepuŝada ✖



Ĉu la trajnfina lokomotivo puŝadas?

4. Novaj taskoj por RailLexic 4.0

En TeKu 130 sur paĝo 8 kaj en TeKu 132 sur paĝo 3 mi traktis la produktmon *Eurobalise* por speciala datumtransigilo / lokalizilo. Jam nun *UIC* enigis la nocion kun pluraj anglaj kaj germanaj terminoj:

12750 Aparato ĉe trako, kiu transsendas datumojn al trajno, por aktualigi la aŭtomatajn sekurecinstalaĵojn ĉe veturiloj koncerne trak- kaj signalilkondiĉojn sur la sekvanta liniosekcio.

angla	<i>track antenna; beacon; balise</i>
franca	<i>balise</i>
germana	<i>Balise; Gleisantenne; Gleisbake</i>

Por eviti tute novan (ne-PIV-an) radikvorton „balizo”, jen du terminproponoj:

- 1) **trakanteno** — BALIZO
- 2) **datumtransigilo laŭpunkta**

PIV klarigas: anteno 3

Metala drato aŭ drataro, kiu servas kiel malfermita oscilcirkvito, por ricevi aŭ elsendi radiosignalojn.